


# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 321 (87) KVINA EPOKO

MARTO-APRILLO 2002

1927-2002



KONGRESA  
DATREVENO  
SÓLLER (MAJORKO)

**ASSOCIACIÓ  
CATALANA  
D'ESPERANTO**



**KATALUNA  
ESPERANTO-  
ASOCIO**

**Apartat, 290 - 08200 - SABADELL  
CATALUNYA - KATALUNIO**

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo  
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj *Esperanto*, *Kontakto kaj libroj*), FEL (revuo *Monato kaj libroj*), IKEL, *Literatura Foiro*, *Heroldo*, *La Kancerkliniko*, *La Ondo de Esperanto*, *Litova Stelo*, *Scienca Revuo* (ni peras ankaŭ aliajn revuojn)

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental) Catalunya/Katalunio Tel: 93 710 96 36 Fakso: 93 716 36 33

**Ret – adreso:** kea@esperanto-ct.org

**Ret – paĝo:** <http://www.esperanto-ct.org>

**Kotizoj por la jaro 2002:** Individua Abonanta Membro 25 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 50 eŭroj; Individua Dumviva Membro 500 eŭroj; Kolektiva Membro 50 eŭroj; Juna Membro 16 eŭroj.

**Banko:** Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona – Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

**Plenumkomitato de KEA:** Prezidanto: Josep Franquesa; vicprezidanto: Joan Inglada; kasisto kaj provizora sekretario: Libert Puig; komitatanoj: Roger Prieto, Anna Casasús, Arnald Massanas

**Kontrola Komisiono:** Sebastià Ribes, Òscar Puig, Xavier Murcia.

**Kataluna Esperantisto:** Libert Puig, Marina Ollé.  
Revizianto: Hèctor Alòs i Font.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

**Kataluna Esperanto-Junularo:** Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

**Imprès a/Presita ĉe:** Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91  
**Dipòsit Legal:** B-27362 - 1982

**Eva Rodon i Armadans** naskiĝis la 15an de marto 2002. Ni gratulas plej kore la feliĉajn gepatrojn, fraton Joel, geavojn kaj ceterajn familianojn.

**MEMORU LA NOVAN RETAN HEJMON DE  
LA KATALUNA ESPERANTISTARO**

<http://www.esperanto-ct.org>

Nova TTT-sidejo dulingva (kataluna kaj internacia), esprimilo de Kataluna Esperanto-Asocio kaj de ties membroj, lokaj kaj fakaj grupoj. Ĝenerala informado:

[info@esperanto.ct.org](mailto:info@esperanto.ct.org)

## 31a KATALUNA KAJ 4a TRANSPIRENEA KONGRESO DE ESPERANTO

### Programo

Ĝis nun konfirmiĝis la partopreno de d-ro Carmel Mallia, elstara Esperanto-poeto kaj prezidanto de Malta Esperanto-Asocio, kiu prelegos pri literaturo kaj pri sia lando – malgranda kaj bela (laŭ la kongrestemo) kaj malmulte konata.

Pri ceteraj programeroj ni informos en venonta revuo.

### Loĝado

Kiel informite en nia antaŭa revuo, ni antaŭmendis 30-ĉambran hoteleton. Ĉiuj ĉambroj estas dulitaj kaj kostas po 72 eŭrojn ĉiunokte kun matenmanĝo. Ĉiu homo pagos po 36 eŭrojn (*ne 49 kiel erare ni anoncis en nia antaŭa revuo*)

Ĉiuaj kongresanoj rajtos ankaŭ senpage tranokti en la kongresejo sur speciala planko, sed nepre oni devas kunporti dormosakon. Neces-ejoj kaj duŝejoj estos je ilia dispono.

### Kolektiva vojaĝo

Kiel anoncite nia asocio organizas kolektivon vojaĝon per aviadilo ĝis Palma kaj de la flughaveno buse ĝis la kongresurbo kaj revene. Ni rezignis la trajnan iron, ĉar mankis tempo por alveni antaŭ la kongres-inaŭguro, okazonta je la 13a h.

Ni antaŭmendis finfine nur 20 lokojn por la aviadilo kaj ĝis nun jam 6 homoj aliĝis. Nepre faru tuj vian mendon, ĉar se ni reagis frue, ankoraŭ eblis remendi novajn lokojn, se necese.

La totala kosto de la vojaĝo estos proksimume 150 eŭrojn, kiel jam anoncite.

## PRELEGO DE DAFYDD AP FERGUS

La konata kimra ĵurnalisto laboranta en Bruselo, Dafydd ap Fergus, sekretario de la nova Brusela Komunikadcentro, vojaĝis al Barcelono por ĉeesti la Kongreson Linguapax, kune kun nia membro Ludoviko de Yzaguirre, prezidanto de la humanitara organizo ESPERO, inter la 15a kaj 20a de aprilo. Nia asocio profitis la okazon por inviti lin prelegi en Esperanto pri la temo "Lingva egaleco kaj Esperanto", sabaton la 20an de aprilo je la 18a vespere, ĉe Unesko-Klubo, kun la kunlaboro de ties Departemento de Esperanto.

La prelego okazis kun ĉeesto de 25/30 geesperantistoj kaj post lia interveno li afable respondis al kelkaj demandoj de la partoprenantoj. Ĉe la fino, nia asocio regaligis la ĉeestantojn per lunĉo.

## KRISTANA MOVADO KAJ ESPERANTO

En la kataluna katolika semajna gazeto "Catalunya Cristiana" (Kristana Katalunio) numero 1 180, je la 2a de majo 2002, aperis preskaŭ 5-paĝa artikolaro pri Esperanto, surbaze de la laboro de la ĵurnalisto Eduard Brufau, kiu informiĝis interalie ĉe niaj membroj Llibert Puig, Manuel Casanoves kaj Gabriel Mora i Arana.

La artikoloj aperas sinsekve ĉe la frontpaĝo kaj sur paĝoj 2a, 3a, 4a kaj 5a. Elstaras la intervjuo al nia membro Gabriel Mora i Arana el Manresa; la informo pri Esperanto en Katalunio kun reprodukto de la kovrilo de nia revuo n-ro 319 kaj bildstrio de la konata desegnistino Pilarin. La diversaj artikoloj estas tre bone verkitaj surbaze de serioza antaŭinformado.

## KORESPONDADO

**Dinko Pavlov**- st. Car Samuil, 61 BG-8000 BURGAS (Bulgario), 59-jara maristo, nuntempe emerita, deziras korespondi tutmonde.

**Vas-Szegedi Julianna** – str.Gargya u.8 – HU-5322 TISZASZENTIMRE (Hungario), 32-jara edziniĝita bibliotekistino, deziras korespondi pri literaturo, E-movado, sporto kaj muziko.

Afganaj rifuĝintaj komencantinoj partoprenantaj en la kursoj de Esperanto sub la projekto "Lingvo de paco", post arda studkomenco kaj diligenta lernado nur deziras korespondi kun geesperantistoj tra la mondo pri diversaj temoj.  
*(Bonvolu diskonigi la korespond-peton kaj kuraĝigu ilin sendante simplan poŝtkarton, kaze ke vi ne havas tempon korespondi kun ili).*

**F-ino Fateme Jafari** – n-ro 32, Mogabel-e Mokhaberat, Falak-e Ruh Abad, Gol Shahr, MASHAD (Irano), 22-jara, interesiĝas pri muziko, junulara agado kaj kulturo.

**F-ino Rona Karimi** – n-ro 77, Bad Az Chahar Rah-e Avval, Kh: Beyhagi, Kh: Rah Ahan, MASHAD (Irano), 19-jara, preferas junajn gekorespondantojn.

---

# NIA AGADO

---

## DUA PREMIO "DELFI DALMAU" POR GAZETA ARTIKOLO

### REGULARO

- 1.-Oni aljuĝos ĉi tiun premion al la plej bona populariga gazeta artikolo kiu pritraktos ajnan aspekton en rilato al la ekologio de la lingvoj, la lingva (mal)egaleco, la Universala Deklaracio de Lingvaj Rajtoj, aŭ la ebla aŭ fakta kontribuo de internacia lingvo kiel Esperanto sur ĉi tiu kampo.
- 2.-Oni rajtas prezenti konkursaĵojn en la kataluna kaj/aŭ en Esperanto. Ĉiu partoprenanto rajtas prezenti tiom da tekstoj kiom oni deziras. Ili estos neeldonitaj kaj en ili oni mencias fakton aŭ studon diskonigitan dum la kuranta aŭ dum la pasinta jaro.
- 3.-La tekstoj ampleksos minimume kvin kaj maksimume dek foliojn DIN A4, tajpitajn je duobla spaco, kun 24 linioj ĉiupaĝe kaj 65 karakteroj ĉiulinie aŭ je simila amplekso. Oni liveros ilin kvinoble.
- 4.-La monsumo de la premio estos 450 eŭroj. La teksto aperos en diversaj periodaĵoj, ĉu katalunlingve ĉu esperantlingve.
- 5.-La personaj aŭtoraj donitaĵoj (nomo, adreso, telefonnumero, loĝloko kaj eventuale ret-adreso) estos kunsenditaj en aparta fermita koverto, sur kiu legeblas la titolo de la prezentita verko kaj, laŭdezire, pseŭdonimo aŭ devizo.
- 6.-La limdato por la akcepto de originaloj estos la 31-a de aŭgusto 2002. Oni sendu ilin poŝte al la adreso: c/ Tossalet,4 ES-25460 Cervià de les Garrigues (Katalunio) indikante sur la koverto: Por la 2a Premio "Delfi Dalmau"
- 7.-La ĵurion de la 2a Gazeta Premio "Delfi Dalmau" konsistigos la jenaj personoj: Jordi Solé i Camardons, Luz Vázquez, Hèctor Alòs kaj Abel Montagut, kiuj povos interkonsente proponi aliajn ĵurianojn ĝis maksimumo de sep personoj. La decidoj de la ĵurio estos neapelacieblaj. La ĵurio rajtos deklari ĝin nealjuĝita, se ĝi konsideros tion oportuna.
- 8.-Oni proklamos la rezulton en la kadro de la 31a Kataluna Kongreso de Esperanto en Sóller (Majorko) dimanĉon la 3an de novembro 2002.
- 9.-Kataluna Esperanto-Asocio rezervas al si la rajton publikigi, aparte aŭ kune en unu sola volumo, la konkursaĵojn kiuj superis la unuan fazon de la aljuĝo de la premio akorde kun ĝia specifa aljuĝa regularo, t.e. la verkojn al kiuj oni atribuis tri aŭ pli da poentoj super kvin en la komuna kvalifiko de la ĵurio.
- 10.-La partopreno en la premio implicas la akcepton de ĉi tiu regularo.

## NIA MEMORO PRI LLUÍS M. HERNÁNDEZ YZAL

Nia veterana samideano forpasis 84-jara la 24an de februaro 2002 en sia loĝloko de St. Pau d'Ordal, pitoreska vilaĝo 12 kilometrojn for el Vilafranca del Penedès kaj 38 el Barcelono.

Multnombraj katalunaj geesperantistoj alvenis ĉe la Muzeo por tre elkore kondolenci la familianojn kaj tuj sekve ĉeesti la enterigan ceremonion. Pro liaj meritoj la forpasinto ricevis la simpation de ĉiuj esperantistoj kaj lia Muzeo estis rendevuo de enlandaj kaj eksterlandaj vizitantoj.

Kiel loka apotekisto kaj dumtempa pac-juĝisto li estis tre respektata de la vilaĝa loĝantaro kaj tre amata de la familio.

La esperantista movado ŝuldas al li la fondiĝon de la tre renoma Muzeo, unu el la plej riĉaj en la mondo. Ĝi konsistis el du fazoj: la 5an de majo 1968 enkadre de la 10a Barcelon-Provinca Esperantista Renkontiĝo, (jen reproduktitaj kelkaj glumarkoj de tiu evento), fondiĝis la Muzeo en ampleksa ĉambro de la apoteko de la fondinto kaj samdate oni inaŭguris la lokan Zamenhof-straton. La 12an de majo 1974 oni inaŭguris enkadre de la 26a Kongreso de la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio la definitivan sidejon de la Muzeo ĉe strato Zamenhof n-ro 12 kun 250 kvadrataj metroj da utila surfaco, kie li dum jaroj ordigis

la amase kolektitan materialon.

Li estis ankaŭ aktiva en la katolika movado kaj lastatempe fariĝis prezidanto de la Katolika Esperantista Hispana Asocio. Pro lia servo al la esperantista movado li fariĝis Honora Membro de UEA.

Kaj ni finu ĉi memorigan tekston per reprodukto de la poemo kiun la esperanto-poeto Francisc Vilà dediĉis al li okaze de la inaŭguro de la unua sidejo de la Muzeo.

Al sinjoro Ludoviko Hernández Yzal




(omaĝaj versoj por esti kantataj laŭ melodio de La Espero)

Kavaliro de la verda stelo,  
La plej pura de la lum' radia.  
Ĝi promesas gloron al la celo  
Honorinda por viv' harmonia.

Ĝis la venko plena jam por ĉiam,  
Ni, fidelaj, ne diros "sufiĉe".  
Nur ni ĉesos en tag' bela kiam  
Nin premios la labor', feliĉe.

Hom' honesta, nobla, malavara,  
Kavaliro de la Pac' amanto,  
Vi, amiko, kora, frata, kara,  
Honor' estas por lingv' Esperanto.

Vivu longe, sane, kun kor' juna,  
Kaj kuraĝe, floru la ideo!  
Post la nokto, sekvas tago suna  
Kaj naskiĝis jam via Muzeo!



---

# NOVAĴOJ

---

## ĴURNALO AVUI

La apero de tri sinsekvaj leteroj de legantoj, L. Isern (1.04.02), M. Bosch (3.04.02) kaj A. Garriga (8.04.02) pledante por Esperanto, provokis reagan sed ankaŭ favoran artikolon de la verkisto kaj universitata profesoro Ferran Sáez la 11an de aprilo. Poste ankaŭ aperis precizigajn leterojn de nia samideanoj Manuel Casanoves, Joan Inglada kaj Martí Guerrero.

La tutan materialon ni ricevis de Hèctor Alòs trarete kaj tre volonte ni sendos papere al tiuj kiuj ne havante reton, nek ĉiutagan ĵurnalon, ne informiĝis pri la afero. Por la retuloj, ĉio aperinta en Avui kaj ankaŭ en aliaj gazetoj estas afiŝita ĉe <http://www.esperanto-ct.org/c/noves.htm> de nia TTT-estro, Joan Inglada.

De antaŭ longe ne okazis en kataluna ĵurnalo tiom ampleksa kaj sinsekva intereso por nia lingvo. Evidentiĝas ke la kaŝita problemo de la estonta interkomunika lingvo por Eŭropo ne nur maltrankviligas nin kaj tio estas bona simptomo. Espereble la ĵus starigita Brusela Komunikadcentro ankaŭ kontribuos al pli bona informado al la eŭropaj politikistoj.

## TURISMAJ INFORMILOJ EN ESPERANTO

Ĵus aperis ĉe ni du informiloj en esperanto, pri kies detaloj ni sekve informas:

La unua eldonita de la kataluna registaro estas broŝuro pri Katalunio ĵurnalformata 45 x 30 cm, 16-paĝa, kun multaj koloraj fotoj kaj teksto en 5 lingvoj: kataluna, hispana, esperanto, angla kaj nederlanda. Ni devas gratuli samideanon Martí Guerrero, kiu okupiĝis pri la esperantlingva traduko.

Mendebla trarete al: [mllanos@correu.gencat.es](mailto:mllanos@correu.gencat.es) aŭ persone aŭ letere al: Generalitat de Catalunya - Direcció General de Turisme - Passeig de Gràcia, 105 - 08008 Barcelona.

La alia estas faldebla informilo pri Valencio, formato 24,5 x 10 cm, kun koloraj fotoj kaj teksto nur en esperanto. Ni devas gratuli la tieajn Esperanto-aktivulojn.

Mendebla ĉe: Oficina de Turisme - Plaça Ajuntament, 1 - 46001 València kaj rete: [turisvalencia@turisvalencia.es](mailto:turisvalencia@turisvalencia.es)

## JACQUES CHIRAC KAJ ESPERANTO

Jen lia respondo de la 15a de aprilo al retmesaĝo de Vincent Charlot:

“Kara sinjoro:

Vi bonvolis altiri mian atenton pri la problemo de Esperanto, kaj mi dankas vin pro tio ĉar, kiel vi jam scias, temas pri afero, pri kiu mi estas sincere favora.

Eĉ se pro kialoj kiujn vi facile komprenas, mi deziras antaŭ ĉio min dediĉi al la defendo de la francparolantaro, mi havas profundan simpatian por Esperanto kaj la humanista projekto, kiu direktis ĝian kreiĝon kaj kiu pli ol iam ajn animas ĝiajn hodiaŭajn defendantojn.

Mi opinias miaflanke, ke la progresado de Esperanto, en la respekto de la kultura diverseco, kiu estas nedisigebla de ĝi, estus potenca faktoro de harmonio kaj kompreniĝo inter la popoloj.

Estas tute sendube, ke se la sorto de la urnoj estos al mi favora, mi submetos al la venonta registaro, kaj aparte al la ministro de la nacia Edukado, la demandon pri ĝia inkludado kiel elekta lernobjekto en la abiturienta ekzameno, aparte pro la deziroj esprimataj fare de la gelernantoj kaj gepatroj, kaj pri la ebleco varbi sufiĉe da kompetentaj ekzamenantoj.

Mi petas vin kredi, Kara Sinjoro, je la esprimo de miaj plej bonaj sentoj.

Plej kore (manskribite)

Jacques Chirac“

## LA KVARA INTERNACIA FOTOKONKURSO

*La Ondo de Esperanto* organizis en 2001 la kvaran Internacian Fotokonkursion. En la konkurso partoprenis 46 fotoverkoj de 15 aŭtoroj el 10 landoj: Britio, Ĉeĥio, Finnlando, Francio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Litovio, Pollando, Ruslando.

La 18an de januaro 2002 la juĝkomisiono anoncis la rezulton.

1a Premio: Anna Skudlarska (Pollando) pro "Estimo" kaj "Revo".

2a Premio: Grazvydas Jurgelevicius (Litovio) pro "Avo kaj nepo"

3a Premio : Robert Kaminski (Pollando) pro "Sonorilturo"

Laŭdaj Mencioj: Raita Pyhala (Finnlando) pro "Ĝuu"; Igorj Lojkin (Ruslando) pro "Fangorn"; Andrea Ottrok (Hungario) pro "Ankaŭ tio estas Frankfurt".

La speciala premio por foto teme ligita kun Esperanto ne estis aljuĝita.

Laŭ la Regularo de la Konkurso, la organizantoj havas ekskluzivan rakton ĝis la 31a de decembro 2002 uzi ĉiujn ricevitaĵojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekzpozicioj. La unua ekzpozicio kun la plej interesaj fotoj de la unuaj tri konkursoj estis okazigita je la Zamenhofa Semajnfino (Kaliningrad 15-16 dec. 2001).

Dankon al la partoprenintoj! Gratulon al la laŭreatoj!

Halina Gorecka

sekretario de la konkurso

## INTERNACIA KONKURSO "PREMIO NAPOLI 2002"

Napola Esperanto-Asocio lanĉas al la internacia esperanta publiko Konkursion "Premio Napoli 2002" pri la temo: "Napoli laŭ rememoro kaj fantazio", kunlabore kun la "Napola Unesko-Klubo" kaj la "Napola Kulturcentro Cosmopolis".

La Premio strukturiĝas laŭ jenaj du sekcioj: Sekcio A): Literaturo (poezio kaj prozo). Sekcio B): Bildarto (desegno aŭ pentraĵo).

Poeziaĵoj, prozaĵoj (noveloj/rakontoj), desegnoj kaj pentraĵoj iel pritraktu, laŭ aŭtoraj propraj rememoro kaj imagivo, iun temon ligitan al la urbo Napoli kaj/aŭ ties ĉirkaŭaĵoj.

### REGULARO

Art.1) La konkurso celas ĉiulandan esperantiston kaj esperanto-parolanton, kiu partoprenu, laŭelekte, en nur unu el la du Sekcioj A kaj B.

Art.2) Ĉiu konkursanto sendu: por Sekcio A): 2 kopiojn de poeziaĵoj aŭ prozaĵoj en esperanto. Por Sekcio B): 1 originalon de ĉiu desegno aŭ pentraĵo (maksimuma formato cm. 50 x 70)

Oni rajtas partopreni en ĉiu sekcio per nur po 2 konkursaĵoj. Ĉiu konkursaĵo estu subskribita per pseŭdonimo. Oni aldonu, en fermita pseŭdonime markita koverto, slipon kun antaŭnomo, familia nomo, adreso kaj eventuale telefonnumero kaj/aŭ retadreso de la konkursanto.

Art.3) Ĉiun konkursaĵon sendu ĝis la 30.09.2002 al : Napola Esperanto-Asocio, Via Pietro Castellino, 115, I-80131 NAPOLI (Italio) tel. + 39 81/5467760

Art.4) En ĉiu Sekcio estos aljuĝitaj fare de ĵurio kun diversfakaj kompetentoj: Unua premio: diplomo kaj Napola artaĵo, Dua premio: diplomo kaj Napola artaĵo, Tria premio: diplomo, Laŭda(j) Mencio(j): diplomo(j).

Art.5) La Premiada Ceremonio okazos en Napoli. Loko, dato kaj horo estos ĝustatempe kaj adekvate diskonigitaj al la gajnintoj kaj al la publiko.

---

# SOLIDARECE

---

## Praktika uzo de la lingvo

Daŭre homoj lernas Esperanton, sed la E-Grupoj ne bone gvidas ilin al ĝia utila praktikado. Kaj estas konate, ke se oni ne praktikas iun ajn lernitan lingvon, iom post iom vi forgesas ĝin. Kaj tio estas la eterna problemo kaj la kaŭzo, ke multaj lernintoj forlasas la movadon. Eviti tion devas esti ĉefa celo de ĉiuj grupgvidantoj. Sugestoj laŭ tiu celo estos bonvenaj kaj ni volonte publikigos ilin en nia revuo.

1).-Faciligi la kontakton inter diverslandaj geesperantistoj estas prioritata celo kaj korespondado estas simpla kaj efika rimedo. Nepre rekomendu, ke viaj lernantoj korespondu. En ĉiuj revuoj aperas korespondpetoj, ankaŭ en la nia.

2).- Alia rekomendinda rimedo estas aliĝi al iu ajn solidareca asocio uzanta Esperanton, per kio vi konstatos la praktikan uzon de la lingvo.

En la nuna revuo ni aperigas kelkajn korespondpetojn sur la internacia paĝo, serĉu ilin kaj reagu laŭ nia ĵusa rekomendo.

De tempo al tempo ankaŭ ni informis pri tiaj solidarecaj asocioj kaj nun ni mallonge priskribas ĝiajn celojn kaj adresojn. Nepre temas pri organizoj kiuj oficiale uzas Esperanton.

## ESPERO, Internacia Humanitara Organizo

Kataluna sidejo: Papa Pius XI,130- 08208 Sabadell - tel.93-727.2758 (Èric) -fakso 93 716.3633 -  
retpoŝto: [cat@espero.org](mailto:cat@espero.org) - TTT: <http://www.espero.org>

Temas pri organizo fondita por helpi al la rekonstruado de Bosnio. La bosnia ĉefa organizo fondiĝis en 1993 kaj la kataluna filio – tamen sendependa – en 1998.

Diversaj projektoj plenumiĝis kaj nova pri rekonstruado de loĝejoj ekas. (ni informos pri tiu nova projekto en la venonta revuo)

Via kunlaboro estos tre bonvena. Fariĝu membro kaj mem elektu vian kotizon.

## Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato

(La Tero nutrus ĉiujn homojn, se ĉiuj solidare agadus)

Ĝi estas asocio (sendependa de la ŝtatoj, sendependa de ĉiaj povoj) konsistanta el ĉiuj individuoj, ĉiedevenaj, kiuj deziras partopreni en la monda solidareco.

Per propraj monrimedoj de kotizoj kaj donacoj ĝi finansas sociajn kaj ekonomiajn ĉefe kolektivajn projektojn rilatajn al la prinutra memsufiĉo, per subvencioj kaj seninterezaj pruntoj.

Oni povas helpi per abono de la esperantlingva revuo, kiu kostas 5 eŭrojn jare, per donacoj, aŭ per membriĝo laŭ propra elektita kotizo (kun rajto ricevi la revuon).

Monda Solidareco-Les Nids- FR-49190 ST. AUBIN-DE-LUIGNE (Francio). Tel.+33 (0)241 78 47 75 (Daniel Durand) - [dan.cdm@wanadoo.fr](mailto:dan.cdm@wanadoo.fr)

(Nia asocio povas tamen peri viajn kontaktojn kun la Monda Fonduso)

## Kontraŭ la mortopuno

Ĉeroka esperantisto N. I. Sekvojo estas kondamnita al morto en Usono ĉe la ŝtata prizono de Quentin en Kalifornio, kaj ni devas kunlabori por eviti tion. Ni distribuas T-ĉemizojn en unika grandeco XL je po 9 eŭroj kaj parto de la gajno iras al la defendo de nia samideano. Mendu ĉe nia asocio. Niajn adresojn vi trovos en la kolofono de nia revuo (2a paĝo)

Se vi deziras informiĝi pri la agado de mortopun-opozicia Esperanto-Grupo jen ĝia retadreso [jschram@skynet.be](mailto:jschram@skynet.be) kaj TTT-paĝo <http://members.tripod.lycos.nl/jakvo/sequoyah.htm>